

## Brexit Signifas Brexit

Ian Rapley (Britujo)

Mi enlitiĝis je la 22a de junio pli certa ol mi estis dum kelkaj semajnoj. La opiniondoj indikis, ke la Unuiĝinta Reĝlando voĉdonos por resti en la Eŭropa Unio, eĉ se nur per malgranda kvanto. Do kiam mi vekigis la sekvantan matenon kaj legis mian telefonon, mi hororigis eltrovi ke "eliri" gajnis.

Ekde la rezulto la lando estis en tumulto. La ĉefministro ekzigis, la pundo falis draste, rasismaj incidentoj resurektis, unu politikisto estis enhospitaligita post oni kverelis kun kolego, kaj eĉ en la koro de 'brexit-lando', kie mi loĝas, kafejoj estas plenaj kun personoj diskutante pri 'kio okazis'. Kial oni voĉdonas eliri, kaj kio okazos poste? Al la unua demando mi povas eble respondi, sed al la dua neniu scias.

52% voĉdonis 'eliri', kaj 48% voĉdonis 'resti'. Skotlando (62%) kaj Norda Irlando (55%) voĉdonis 'resti', Anglio (53%) kaj Kimrio (51%) voĉdonis 'eliri'. Universitato-urbetoj voĉdonis 'resti', eks-industriaj areoj voĉdonis 'eliri'. La junaĵ voĉdonis 'resti', la maljunaĵ voĉdonis 'eliri'. Laboristoj 'eliri', la burĝaro 'resti'. Plej surprize, areoj kiuj ricevas la plej EU-financadon voĉdonis 'eliri'.

La plej konvinka analizo diras, ke la personoj kiuj ne profitis de tutmondiĝo voĉdonis 'eliri' en pli grandaj nombroj. Kvankam la EU ne estis la kaŭzo de liaj problemoj, lokoj kiel Suda Kimrio, aŭ nordoriente Anglio, voĉdonis por ŝanĝo - ajna ŝanĝo. La industrioj (karbo kaj ŝtalo) de tiuj regionoj malpliiĝis ekde la 1980-aj jaroj: EU subvencioj ne povis anstataŭi la senton de identeco kaj celo, kiuj perdiĝis kune kun laborpostenoj.

2016.xx

Kio estu la en la estonteco de Britio? Neniu scias. La nova Ĉefministro, Theresa May diras "Brexit signifas Brexit", sed kion Brexit signifas? La grava decido estas enmigrado aŭ komerco. 'Eliri' kampanjantoj volas limigi enmigradon, sed la brita ekonomio bezonas liberan komercon kun la EU komuna merkato. Aliro al la merkato bezonas malfermi landlimojn ene de EU.

'Malmolan Brexit' signifas kompleta eliro de la EU & la komuna merkato. Ĝi reduktus enmigradon sed ĝi eble estos ekonomia katastrofo. 'Mola Brexit' signifas ion kiel la Norvegio-modelo - ekster la EU-politiko, sed interne de la ekonomiaj kaj sociaj institucioj. Tio retenus aliron al la merkato, sed ĉu tiu satigos la eliri-balotantojn ?

Kun tia kompleksa intertraktado, ĝi povas ne ebli por forlasi la EU. Kiel la vortoj de Hotel California: "Vi povas elskribiĝi en ajna tempo vi deziras, sed vi neniam povos eliri".